

6 ☆ 1995 ☆ 167

STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

"Kulturo - valoro aŭ varo?"

81-A
UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO
Prago (ĈeĤa Respubliko)
21-28 julio 1996

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
aperas 6-foje jare. Abono 15 gld.

Komercaĵ anoncoj: 25 Kč por unu linio,
800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por
duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla
reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30%
rabato.

Membrokategorioj: A 160 Kč, B 80 Kč, (C
nulgita), D 40 Kč, E 40 Kč, F 3200 Kč, G
100 Kč (Starto), eksterlandanoj 20 ECU,
enkribo 20 Kč.

**Zvýhodněné podmínky účasti
Čechů a Slováků na UK Praha 1996**

V minulém čísle Starta jste dostali i přihlášku na UK Praha 1996 platnou pouze pro obyvatele České republiky a Slovenské republiky. Vedení UEA schválilo pro nás zvláštní slevu, aby se kongresu mohlo zúčastnit co nejvíce domácích esperantistů.

Zadarmo se může kongresu zúčastnit mládež narozená po 31.12.1975 a nezbytní průvodci invalidních esperantistů. Mládež narozená po 31.12.1965 a invalidé mají nižší poplatky než zdraví dospělí. Za invalidy se ovšem považují pouze ti, kteří nutně potřebují průvodce a mohou to doložit lékařským osvědčením. Stejnou slevu obdrží i společník hlavního přihlášeného (oba musejí mít stejné trvalé bydliště).

Další slevy mají individuální členové UEA (Dumviva Membro, Membro kun Jarlibro, Membro-Abonanto), kteří mají zaplacen příspěvek na rok 1996 (netýká se to však kategorií Aligitaj Membroj a Membro kun Gvidlibro). Sleva se rovná členskému příspěvku pro *Membro kun Jarlibro* (340,- Kč), takže zvažte možnost stát se individuálním členem UEA.

Pro výši poplatku je dále důležité, zda zaplatíte do konce roku 1995, do konce prvního kvartálu 1996 nebo později.

Kongresový poplatek je **nevratný** i bez viny přihlášeného, **nepřenosný** na jinou osobu a **nezahrnuje** ubytování, stravu ani výlety. Jednodenní vstupenka na kongres nebude zlevněna a přijde zhruba na 1000 Kč.

Členské příspěvky CES

Kategorie

- A 160 Kč - výdělečně činní
 - B 80 Kč - důchodci, studenti, vojáci základní služby, ženy v domácnosti, invalidé, nezaměstnaní
 - C - zrušena
 - D 40 Kč - rodinní příslušníci (další členové domácnosti, kde už jeden odebirá Starto za plné členství)
 - E 40 Kč - příznivci esperanta a děti (nedostávají Starto)
 - F 3200 Kč - doživotní členství
 - G 100 Kč - příznivci esperanta dostávající Starto
- cizinci 20 ECU
zápisné 20 Kč.

NOVA LERNOLIBRO

LS 019 =69.00

Petr Chrdle, Stanislava Chrdlová:

Esperantem za tři měsíce, 160 str.

Kurs esperanta pro začátečníky rozdělený do 60 lekcí (= pracovních dnů) a doplněný čítankou.

(Esperanto dum tri monatoj, 160 p., kurso por komencantoj, ĉiu el 60 lecionoj respondas al unu labortago, aldone legolibro)

Konferenco de ĈEA

Entute 105 personoj el 44 kluboj konferencis en Brno sabate la 21-an de oktobro 1995 en hotelo Kozák. Komprenoble ĉiuj alvenis jam vendrede vespere kaj aŭskultis rakontadon de Miloš Šváček pri IKUE-kongreso en Olomouc kaj de Vlastimil Kočvara pri UK en Tampere.

La propran konferencon malfermis sabate matene vicprezidanto Petr Chrdle. Prezidanto V. Kočvara informis pri la nova maniero de presado kaj distribuado de Starto, pri membrobazo kaj pagado de kotizoj (nur okcent membroj nun ricevas Starton, aliaj ne pagis plenan kotizon). Multaj membroj ĝis nun ne resendis la membrokartojn kaj tial la asocia kartoteko (komputila „sliparo“) ne povas esti sukcese finita. Ankaŭ laboro de niaj sekcioj ofte stagnas kaj bezonas reviviĝon.

Drahomír Kočvara tra legis raporton de forestanta Linhart Rýznar pri la kontrolo komisiono kaj V. Kočvara prezentis raporton pri la ekonomia situacio de la asocio kaj pri la preparoj por UK 1996 en Prago. Li klarigis, ke la kritikataj Unua Bulteno, priskribanta nur Pragajn preĝejojn, kaj la kongresa afiŝo kun armitaj apostoloj forlasantaj la Malnovurban Urbodomon estas senpagaj donacoj de Pragaj vojaĝagentejoj.

La tuta posttagmezo estis dediĉita al raportoj kaj informoj de reprezentantoj de unuopaj kluboj kaj sekcioj, ekz. pri infanoj, skoltoj kaj junularo, pri Esperanto-tendaroj, pri fervojistoj, handikapuloj, pri Pasporta Servo kaj pri

Delegita Reto de UEA k.a.

S-ano Žák metis la demandon, kiamaniere altiri al la movado la junularon, kaj venis al konkludo, ke antaŭ ĉio ni devas ĉesi mensogi kaj plibeligadi la realon. La celo ne sanktigas la rimedojn, kaj plie: kvankam ni ofte lamentas pri junularo, la gejunuloj estas pli puraj ol plenkreskuloj kaj ĉiu falseco, eĉ bonintenca, ilin forpuŝas.

En vespera arta programo deklamis sinjorino Alena Růžičková-Pavličnová, aktorino kaj Honora Membrino de ĈEA, kantis basulo Václav Halíř el Janáček-operejo kaj Štěpánka Rousková el Praga klubo, kiu prezentis kantojn de s-ano Lubomír Huf el Ivanovice. Sekvis dancamuzo kun tombolo.

La kantoj de s-ano Huf estas unika provo komponi muzikon al esperantlingvaj originalaj poemoj, konkrete de bulgaraj poetoj, kaj en la voĉo de Š. Rousková, kvankam amatorino, ili trovis bonegan interpretiston. Eĉ Majstro Halíř haltis, forirante, kaj aŭskultis.

Festivalo de Esperantaj filmoj kaj videofilmoj sekvis kiel dimanĉa programo en proksima teatreto Barka.

Tri filmojn aŭtoris Roman Dobrzynski: **Spuroj de la avo** pri vivlokoj de juna Zamenhof, **Granda origino** pri la religia centro Oomoto en Japanio kaj **Mazi en Gondolando**, desegnita videokurso por infanoj, kiu nun furoras en Esperantujo. Ni vidis nur fragmenton de iu leciono: Mazi estas granda verda urso, kiu alvenas en kosma spacŝipo viziti la planedon Gondolando, kie lin atendas amikaj reĝo kaj reĝino, sed ankaŭ kelkaj malamikoj, preparantaj atencan. La sce-

noj estas spritaj kaj interrompataj per koncizaj gramatikaj klarigoj, ekz. *kioma horo estas?*

Ĉeestanta germana esperantisto Horst Theurich prezentis siajn du amatorajn filmojn: **Nekutima vojaĝo** pri provo traveturi per historia eta lokomotivo kun malgrandaj feraj vagonoj malnovan fervojon al kalkominejo, kien iam veturadis laboristoj kaj ministoj de kalko. La fervojo jam estis surkreskita de trudherboj kaj finiĝis en marĉejo. En **Sugar Train** la aŭtoro envideigis veturon en eĉ pli ekzotika trajno sur Fiĝi-insuloj pasintjare tra tropikaj vilaĝoj kun nigrula loĝantaro, manĝadon de sukerkano en la trajno kaj kantadon kun gitarludo prezentitan de negraj konduktoroj por blankulaj gastoj.

Diina masaĝo estas speco de japana aerobiko, dum kiu kraketas artikoj, fakte la ostoj de la tuta korpo ree enartikiĝas en ĝusta pozicio, kio tre prosperas al sano. Dum UK en Prago la aŭtoro prezentos sian metodon en senpaga du-semajna kurso.

Rememoro je festotagoj al dudekjariĝo de ĈEA en Havířov estis amatora videofilmo el 1989 de aŭtoro triopo Milan Bača, Petr Gomola kaj Zdeněk Heiser.

La festivalon kompletigis ankaŭ spektaklo de vivantaj ludantoj: kvar surdmutaj knabinoj, studentaj aktoradon ĉe Janáček-akademio, prezentis teatraĵon **Tri diablaj fratinoj**. Ni multon ne komprenis, ĉar ili interparolis en gestlingvo (feliĉe oni legis antaŭe la enhavon), sed ni povis iomete enrigardi en la mondon de surdmutaj handikapuloj kaj kompreni,

ke ankaŭ en ilia „lingvo“ eblas aktori.

IKUE-sekcio

Nunjare okazis du gravaj aranĝoj, kiujn organizis la katolika sekcio. Julie tre sukcesa 48-a Kongreso de IKUE en Olomouc nerekte propagandis ĉe tutmonda esperantistaro la okazontan venontjaran Universalan Kongreson en Prago pruvinte, ke la ĉefaj esperantistoj kapablas organizi internaciajn aranĝojn. La kongreso bone propagandis Esperanton ankaŭ enlande, praktike pruvante, ke la dumtempa ne tro favora periodo de ekstere influita estas nenia agonio. Urbo Olomouc oficiale transprenis altan protektadon de la kongreso kaj tri vicurbestroj aktive partoprenis la programon: unu dum solena inaŭguro eĉ esperantlingve alparolis la kongresanojn, alia akceptis reprezentantojn de 14 ĉeestantaj landoj. Ĉiutagaj diservoj en gravaj preĝejoj de Olomouc, kie ĉeestis ankaŭ multaj neesperantistoj, kaj en la plej gravaj pilgrimlokoj de Moravio, estis efika prezento de Esperanto, precipe se la esperantlingvan meson celebris ekleziaj altranguloj kiel Kardinalo Miloslav Vlk, Ĉefepiskopo Jan Graubner kaj Episkopo Josef Hrdlička kun asistantaj 14 pastroj el kelkaj landoj.

Dua plej grava aranĝo de katolika sekcio estis la tendaro okazinta jam la kvinan fojon en Sebranice apud Lito-myšl. Ĉeestis partoprenantoj el 5 landoj kun 90-procenta partopreno de junularo, ĉar gvidaj postenoj estas konfiditaj al kapablaj gejunuloj, kiuj pruvis sian maturecon transpreni estontecon de la tendaro tute en siajn manojn.

Malfavoraj kondiĉoj por disvastigi Esperanton nuntempe ne devas nin puŝi en rezignan pasivecon. Esperantistoj ĉiam estu optimistoj rigardantaj antaŭen. La katolika sekcio nun eldonis du propagandilojn: la unuan pri Esperanto kaj la duan pri katolika Esperanto-movado.

Bonvolu informi viajn klubanojn pri la ekzisto de katolika sekcio kaj la gazeto Dio benu.

Miloslav Šváček

Regiona renkontiĝo de IKUE-sekcio

okazis en Písek (30.9.-1.10.1995) kunlabore kun la klubo Ponto en studenhejmo PETRINUM. Trideko da partoprenantoj post diservo celebrata de pastro Xaver Kobza aŭskultis prelegojn, trarigardis la urbon kaj amuzis sin per muzikado kaj kantado.

Renkontiĝo en Lanškroun

Sabate la 14-an de oktobro renkontiĝis gesamideanoj el najbaraj EK el Žamberk, Svitavy kaj Česká Třebová. Antaŭtagmeze ili vizitis muzeon, aŭskultis prelegon de kristana verkisto Jan Žáček kaj posttagmezon pasigis en restoracio en kutima familia rondo. Ing. Polák informis pri vojaĝo al IFEF-kongreso en Pécs kaj pri kultura kaj komerca agentejo en Prago, kies gasto li estis. La restoraciestro montris favoron por nia aranĝo kaj intereson uzi Eon ankaŭ en sia manĝo-karto kune kun aliaj fremdaj lingvoj.

La 8-a Internacia kultura festivalo en Ústí nad Labem finiĝis per granda sukceso

Tio ne estas memlaŭdo de organizantoj, sed konstato de multaj ĝiaj

partoprenantoj.

La festivalo okazis jam tradicie kiel rememorigo de E-verko de s-ro Jiří Kořínek el Ústí n.L. kaj d-ro Tomáš Pumpr el Prago al iliaj neĝisvivitaj naskiĝtagoj. La festivalon partoprenis entute 74 partoprenintoj el kvin landoj. Krom ĉejoj alveturis pli ol 20 gesperantistoj el Germanio kaj pluaj el Luksemburgio, Pollando kaj Slovakio. Programo de la festivalo estis tre bunta. Dum vendreda interkona vespero eksonis diversspecaj informoj el samtempa E-movado kaj malgrandaj kulturaj programeroj fare de M. Smyčka el urba teatro en Ústí n.L. kaj Jadwiga Gibczynska el Unuaktora teatro en Krakovo.

Dum sabata prelega matineo estis prezentitaj 10 interesaj kontribuajoj el kultura sfero. „Ora punkto“ de festivala programo estis sabata solena vespero en Malgranda Scenejo de Domo de kulturo. Tie eksonis operarioj, klasikaj kantoj, poezio kaj prozo el la verko de ambauj supre nomitaj E- eminentuloj (sed ne ekskluzive el ilia verko) prezentitaj per artistoj el Nacia Teatro en Prago, Urba Teatro en Ústí n. L. kaj el Unuaktora teatroj en Prago kaj en Krakovo. La festivalo estis finita per dimanĉa busa ekskurso al la kastelo en la urbo Duchcov.

Je la fino de la festivalo ĉiuj esprimis kontenton ne nur kun ĝia nivelo, sed ankaŭ kun persona prizorgo al diversaj deziroj kaj pretoj de unuopaj partoprenantoj.

Tial ni jam nun antaŭĝojas la festivalon venontajaran, al kiu mi vin ĉiujn elkore invitas.

Ing. Josef Kříž
prezidanto de EK
en Ústí n.L.

Fondaĵo Karolo Piĉ

La 15an de aŭgusto 1995, en sia naskiĝ-urbo Litomiŝlo, mortis la Esperanto-verkisto Karolo Piĉ (* 1920-12-06). Tuj post lia morto familianoj kaj amikoj decidis starigi Fondaĵon Karolo Piĉ (FKP) kun la intenco teni viva la memoron pri la verkisto kaj zorgi pri la eldono kaj konstanta haveblo de liaj verkoj.

La Fondaĵo estas instalita ĉe Iltis-Eldonejo, kiu ĝis nun zorgis pri la eldono de la verkoj de Karolo Piĉ. En ĝi kunagas provizore la jenaj personoj:

Ortwin DEUBERT (posedanto de Iltis-eldonejo), Claude GACOND (arkivisto de CDELI), Irmi HAUPENTHAL, Reinhard HAUPENTHAL (administranto de FKP), Marie KORWIN (fratino de Karolo Piĉ), Herbert MAYER (direktoro de IEMW), Gonçalo NEVES (literatura kunordiganto de FKP), Věra ONESOR-KOVÁ (vidvino de Karolo Piĉ), Baldur RAGNARSSON, Henri VATRÉ.

Celoj de la fondaĵo

1. Publik-rilata laboro

1.1. Havigi straton kun la nomo de Karolo Piĉ en Litomiŝlo

1.2. Fiksi memor-tabulon sur la naskiĝdomo en Litomiŝlo

1.3. Starigi tombo-ŝtonon kun Esperanta surskribo sur la tombo de Karolo Piĉ

1.4. Sugesti prelegojn, studojn, simpoziojn ktp. pri la verkaro de Karolo Piĉ

1.5. Alvoki la esperantistaron kolekti kaj disponigi al FKP dokumentojn pri Karolo Piĉ (korespondaĵoj, manuskriptoj, fotoj ktp.)

1.6. Kolekti antaŭmendojn kaj mon-

donacojn por ebligi la aperigon de ĉiuj neeldonitaj verkoj de Karolo Piĉ

2. Postlasaĵo

2.1. Zorgi pri la kolektado, konservado, ordigado kaj sistema indeksado de la postlasaĵo de Karolo Piĉ:

2.11 de ĉiuj manuskriptoj kaj tajposkriptoj

2.12 de ĉiuj korespondaĵoj de kaj al Karolo Piĉ

2.13 de aliaj dokumentoj (fotoj, atestoj, diplomoj ktp.)

3. Eldonado

3.1 Eldoni la pres-pretajn tajposkriptojn

3.2 Pres-pretigi la finitajn manuskriptojn

3.3 Redakti kaj pres-pretigi ĉiujn ceterajn manuskriptojn

3.4 Reeldoni elĉerpitajn verkojn

3.5 Protekti la aŭtorajn rajtojn de Karolo Piĉ

4. Dokumentado

4.1 Pretigi kompletan bibliografion de la verkaro de Karolo Piĉ (monografioj, kontribuoj al libroj kaj revuoj; literaturo pri Karolo Piĉ)

4.2 Prepari memor-volumon por la 80-jariĝo en la jaro 200 (Enhavo: rememoroj de parencoj, amikoj, sam-tempuloj; fotoj; literaturaj studoj pri Karolo Piĉ; bibliografio)

4.3 Eldoni katalogojn de la postlasaĵo (kp. 2.2 kaj 2.3)

Kiel subteni la Fondaĵon?

Ekzistas diversaj manieroj subteni la Fondaĵon:

- Kontribui al la realigo de la celoj

- mendi la jam aperintajn verkojn de Karolo Piĉ

- antaŭmendi aperontajn verkojn (profiantante de la antaŭmenda prezo)

- helpi finance per mon-donacoj

Niaj kontoj

en D: *Postbank Saarbrücken 20100-661 (Iltis-Eldonejo)*

en F: *CCP Nancy 397 34V (je la nomo de R. Hauptenthal)*

ĉe UEA: *ilti-c (Iltis-Eldonejo)*.

La verkaro de Karolo Piĉ

Ĝis nun la jenaj verkoj de Karolo Piĉ aperis libro-forme ĉe Iltis-eldonejo:

La liĝomiŝla tombejo (1981). Romano, 276 p.

Angoro (1982) Poemaro, 97 p.

La mortsonorilo de Chamblay (1983). Detektiva romano, 249 p.

Obsedo (1984), Poemaro, 143 p.

Naturalismo kaj Skemismo (1987), 76 p.,

Klaĉejo (1987). Romano, 188 p.

Urbi et orbi (1989) Repliko al G. Silber, 20 p.

La bermuda triangulo (1989) Novelaro. 186p.

Frua pledo por la Iltisa Skolo (1989) Analizo de revuo "La Esperantisto" (1889-1895), 31p.

Perspektivoj de la Ilustralo (1994) Esperantologio, postparolo de R. Hauptenthal, 23p.

Jus aperis:

La interna vivo de Esperanto (1995) Eseoj. Interlingvistiko, evoluo de Esperanto, lingvaj rimedoj en Esperanto ktp., 401 p., postparolo de R. Hauptenthal (63,- DM)

En preparo:

Kritiko kaj recenzistiko en Esperanto. Devoj de la recenzo, ĝia esplorkampo, monografioj, kritikistoj. (75,- DM)

Ordeno de verkistoj. „Romano - fabelo, fabelo - romano. Tre certe, tre verŝajne mia romano ultima. Cigna kanto, se vi volas, jes! Plenajn tri jarojn mi verkadis.“ (63,- DM)

Verkoj aperintaj en Ĉeĥio:

En la revuo *Esperantista*:

Aŭtunaj arboj, Reloj (9/1946, p. 90) poemoj

Versisto (9/1946, p. 92) poemo

La poeto (1/1947, p. 5) poemo

Antaŭsignoj (3/1947, p. 25) poemo

Melankolio (4/1947, p. 37) poemo

Georgino (4/1947, p. 38) poemo

Printempa invito, Eĉ la statuoj erigos... (4/1947, p. 39) poemoj

Ŝia ekskurso (1/1948, p. 4) poemo

Amara rerigardo, Poŝpoemo, Ordinaraĵ tagoj (1/1948, p. 16) poemoj

Matene (5/1948, p. 53) poemo

Ĝis la revido, Manĝo! (6/1948, p. 71) poemo (korekto de preseraro sur p. 79)

Vespera psalmo (3/1949, p. 19) poemo

Esperantaj neologismoj (8/1949, p. 57-60, kaj 9/1948, p. 65-71) Prelego farita en la Somera Kolegio de Esperanto en Doksy en Julio 1949.

En la kajoroj de AEST:

Lingvaj rimedoj de la Esperanta prozo (1982) Prelego por kajero SAEST 1982, České Budějovice, p. 80-86

Principoj de Esperanto (1984) Prelego prezentita dum AEST 1980, sed aperinta nur en kajero de AEST 1984, Brno, p. 152-160.

Ĉu iu scias pri aliaj verkoj?

Aŭtoraj rajtoj

En la pasinta numero de Starto 5/95 mi publikigis kelkajn fragmentojn el la verkaro de Karolo Piĉ omaĝe al la memoro de la forpasinta aŭtoro, sed sen antaŭa interkonsento kun la heredantoj de aŭtoraj rajtoj (Věra Onesorková, la vidvino, kaj Iltis-eldonejo). De ambaŭ mi petas pardonon.

La aŭtora leĝo permesas represi sen aŭtoro konsento sole politikajn kaj ekonomiajn aktualaĵojn el gazeto al gazeto, sed ne el libro, ne beletron nek sciencajn analizojn kaj ankaŭ ĉe la aktualaĵoj ne devas esti iamaniere esprimita rezervo de la aŭtoraj rajtoj. Necesas indiki la fonton.

La aŭtorajn rajtojn posedas la aŭtoro por eterne, eĉ post sia morto. Neniu rajtas eldoni lian verkon sub sia nomo aŭ ŝanĝi lian verkon. Peti permeson de publikigo kaj pagi honorarion al la heredantoj de la aŭtoro oni devas ĝis 50 jarojn post lia morto. Onidire estas preparata renovigo de la leĝo, kie la templimo estos levita ĝis 75 jaroj.

Miroslav Malovec

TRADUKOLOGIO

Gvidlibroj por la vojo al primajstrado de la tradukarto

Bernard Golden

Kriterioj por utila bibliografio

En sia artikolo „Pri tradukado de beletro“ (Starto, n-ro 160, 3/1994, pĝ. 13-15) Miroslav Malovec listigas ĉe la fino verkojn, kiujn lia opinie tradukemaj esperantistoj devas trastudi aŭ daŭre konsulti por perfektigi sian traduk-laboron. El la 33 titoloj, la plejmulto estas en la ĉeĥa lingvo; nur 9 verkoj estas uzablaj de alilingvuloj. Cetere, por informi legontojn pri la valoro de la libroj, ne sufiĉas la nudaj titoloj. Kompetente kompilita bibliografio pri tiu ĉi temo devas inkludi mallongan priskribon de la enhavo kun takso pri ĝiaj plej valoraj trajtoj kaj ankaŭ mencio de misoj kaj mankoj. Tiu ĉi artikolo servos kiel suplemento por kompletigi la liston de Malovec per speco de verkoj, kiun li

ne inkludis.

1. KALOCSAY, Kálmán. Kiel verki kaj traduki poemojn. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio. 1979. 26 pĝ.

Tiu ĉi broŝuro estas represaĵo de du studoj, „La esperanta rimo“ kaj „Pri la esperanta ritmo“, kiuj aperis la unuan fojon en Lingvo Stilo Formo en 1931. La celo de Kalocsay estas prezenti detale ellaboritajn normojn de Esperantaj prozodio kaj rimtekniko, kiuj estas sankciitaj de longa tradicio. Kalocsay deziras fortimigi tiujn, kiuj, sen kono de la elementaj prozodiaj kaj rimteknikaj reguloj, arogas al si traduki verkojn de grandaj poetoj; male, li volas kuraĝigi homojn, kiuj ne ŝparas tempon kaj penadon por ellerni tiom el la arto de poem-tradukado, kiom fakte estas ellemebla.

2. DE DIEGO, Fernando. Pri Esperanta tradukarto. Saarbrücken: Artur E. Iltis; 1979. 71 pĝ.

Same kiel Kalocsay estis eminente kvalifita doni konsilojn pri la tradukado de poezio, ĉar li dum longa tempo praktikis tiun metion, Fernando de Diego potencas sur la tereno de proz-tradukado surbaze de impona listo de beletraĵoj plejparte elhispanigitaj. En ses ĉapitroj, origine prezentitaj en la formo de prelegoj, de Diego tuŝas ĉiujn pridiskutindajn aspektojn de la Esperanta tradukarto en la pasinteco, la nuntempo kaj la estonteco. Li faras sian plej trafan kritikon en la ĉapitro pri komparo de Esperanto kaj la naciaj lingvoj, ne hezitante reliefigi la malavantaĝojn de Esperanto

kiel tradukilo por atingi altnivelajn rezultojn. Tre valora parto de la broŝuro de de Diego estas la notoj (pĝ. 63-66), kiu enhavas bibliografiajn referencojn de aliaj verkoj temantaj pri la Esperanta tradukarto.

3. MITEV, Venelin. Tradukarto. Sofia: Bulgara Esperanto-Asocio; 1991. 114 pĝ.

Laŭ mia scio, tiu ĉi verko estas la plej ampleksa manlibro pri la tradukarto ĝis nun eldonita en Esperantujo. En 26 ĉapitroj la aŭtoro pritraktas tre specifajn temojn kiel elekton de tradukotaj verkoj, tradukproblemojn ligitajn al diversaj beletraĵaj ĝenroj, stilistikajn demandojn, neologismojn, kaj problemojn de diversaj niveloj de lingvouzo (ekzemple dialekto, slango, proverboj, vortludoj). En la ĉapitro titolita „Vortaroj kaj helpiloj“, Mitev, same kiel faris Malovec, listigas almenaŭ 28 vortarojn, kiujn devas posedati tradukemulo; el ili nur 8 estas en la bulgara lingvo.

4. DE DIEGO, Fernando. La degenero de William Auld. Recenzo de Montara Vilaĝo. Saarbrücken: Artur E. Iltis; 1985. 11 pĝ.

Malofte estas publikigita detala kritiko pri verko tradukita en Esperanton. En sia analizo de Montara Vilaĝo, elangligita de William Auld, la recenzanto listigas pli ol ducent malbone tradukitajn erojn kaj kondamnas la tradukinton, kiu misinterpretis la anglan lingvon. Tiel de Diego aplikas en praktika maniero la principojn por taksi tradukaĵon, kiuj troviĝas en lia libro Pri Esperanta tra-

dukarto. Mi ne opinias, ke la mistraduko de Montara Vilaĝo estas izolita kazo en la historio de la Esperanta beletro. Mankas simile profundaj analizoj de aliaj esperantigitaj beletraĵoj, ĉar ne estas literatoroj, kiuj emas okupiĝi pri detalaj komparoj de Esperantaj tradukaĵoj kun la etnolingvaj originaloj. Mi rekomendas ĝuste tian taskon kiel ekzercon por partoprenantoj en kurso pri tradukarto.

Konkludo

La ĉi-supraj prikomentitaj verkoj estas mia elekto de kelkaj praktikaj kaj teoriaj pritraktoj utilaj por ĉiuj esperantistoj laborantaj super problemoj de beletra tradukado kaj stilistiko. Krom tiuj libroformaj publikigaĵoj, ekzistas pluraj artikoloj kaj eseoj temantaj pri diversaj aspektoj de la tradukarto. Mi proponas, ke iu esperantisto, kies fako estas bibliotek-scienco, kompilu liston de tiuj verkoj dise publikigitaj en periodaĵoj, por eventuala eldono kiel studmaterialo en kursoj kaj seminarioj.



HOMONIMOJ en Esperanto,
konsiderataj nomenklature 7
 Josef Kavka

-A-, -E-, (I, O, U)

La sepa fojo (STARTO, 1994, 4, 20-21, 5/6, 23-26, 1995, 1, 12-14, 2/3, 17-19, 4, 8-11, 5, 5-7) de niaj konsideroj tuŝas jenan problemon: Se -A- (E, I, O, U) estas ne radikparto, sed substantiva finaĵo latina, ĝi apenaŭ povas konsistigi radikon de Eo-vorto. Ekz. en *flamma* malkaŝas forfalon de tiu -A- la plurala dativo *flammus*. Nature, la **fundamenta** Eo-vorto estas **flamo**, ne „flamao“.

Same oni devus procedi okaze de ĉiu latinforma nomenklatura analogo. Bedaŭre, ekzistas alia **fundamentaĵo**, la serpent-nomo boao (en, fr, it, la, po, ru, sl: boa). Spite al la dusilabeco de la nomo en la sep etnolingvoj, Eo havas nomon trisilaban, iom kurioze kun la vokaltriopo. Ĉu „boo“ ne estus pli oportuna?

La **oficiala** kakao ne koncernas nian problemon: la hispana lingvo adoptis ĉi tiun indiĝenajon, kiu do havas nenion komunan kun la latino.

Da **neoficialaĵoj** ni volas ataki multon:

1. alkao laŭ PIV estas aŭko. Al ni ŝajnas, ke ambaŭ nomoj estas misformitaj. *Alea* devus fariĝi **eleo**, *Alcidae* **alcedoj**;
2. arao. Kial *Ara* ne esperantiĝu - spite la homonimecon - **aro**? Pri ĉi tiu papagogenro, nia argumentado estas la sama, kiel pri la serpentogenro boao;

3. damao el **cervedoj**, nomenklature *Dama*, sed latine *damma*, devus fariĝi **damo**, sen timi la homonimecon kun nobela sinjorino!;

4. firmao = firmo 1, laŭ PIV. Malfacile ni komprenas, kial oni devas apliki paroniman radikon al la komerca entrepreno. la **fundamentaĵo** firmo (*de: Firma, plurale Firmen, en: firm, fr: firme*). Evidente, tiu -A- ne apartenas al la radikoj;

5. Ganao ne originas en la lingvo latina. Tamen, ni ne preterlasas la okazon por pruvi, ke en eŭropaj lingvoj, tiu fina -A forfalas en derivajoj (*cs: ghanský, en: Ghanian, fr: Ghanéen*). Do, laŭ PM (1971): **Gano**.

6. gutao. Bedaŭre, ni ne sukcesis trovi diverslingvajn ekvivalentojn de tiu ĉi enigma hemiaĵo. *Portmann-Rogers* (1993) listigas nur *de: Koagulat, en: coagulum*, kiuj rilatas al la 1-a signifo de la kaloĉaja termino;

7. jukao (*Yucca*) el agavaĵoj (laŭ PIV: liliaĵoj) devas esti **juko**. La speci-epiteto *yuccodes* = **juk(ec)a**. Oni ne timu, ke la sandominga planto kaŭzus jukadon... Se oni tamen timus, eblus skribi **jukko**.

8. kalao (*Calla*) el aracoj (Araceae), laŭ PIV „arumacoj“ estas nomenda simple **kalo**. Por mencii la pli superajn taksonojn: ordo araloj (*Arales*), klaso liliidoj (*Liliidae*). Analoge al jukko oni povus skribi **kallo**. Ĝia prononco estus same (mal)facila kiel de la vorto mallarĝa ...

9. kalandrao (*Calandra*) el la koleoptera familio de kurkuliedoj devus nomiĝi **kalandro**, same kiel la specio de la birdogenro melanokorifo el alaŭdedoj.

Konfuzo pro homonimeco ne estas probable;

10. kamerao (camera) estas superflua, nepre evitinda paronimo al la fundamenta **kamero**, kiu - laŭ PIV - povas signifi ankaŭ kinokameron;

11. kanao (*Canna*) el kan(n)acoj estu **kan(n)o**;

12. karao (*Chara*), algo el la klaso de **ĥaroficeoj** (*Charophyceae*) devas esti **ĥaro**. Jen pli eleganta eskapo el la homonimeco ol per la gluo de A al la radiko;

13. kolerao (*cholera*) laŭ PIV = ĥolero. Por resti ĝentilaj, ne ne komentu la misformaĵon;

14. komao (*comma*) certe devus esti la fundamenta **komo**, kun la 3-a, la muzika, senco;

15. limao (*Lima*). Se oni ne timas konfuzon de la ĉefurbo Limo kun ajna limo, kial oni timas okaze de la moluskogenro **limo**?;

16. novaio (*nova*). En la seslingva *Astronomical Dictionary* (1961) ni legas, ke la pluralo estas *novae*, laŭ la latina formo. Tiu pluralo estas uzata en multaj lingvoj, ekz. *de, en, fr, it*. Do la radiko estas *nov-*. En Esperanto: **novo** aŭ **nova stelo** (*de: Neuer Stern, fr: étoile temporaire, it: stella nuova, ru: novaja zvezda*);

17. purpurao (*purpura*) alportas superfluan radikon, dum la fundamenta **purpuro** estas sinonima al „purpurao“ (laŭ sia 3-a senco en PIV). Kial do oni nomu la haŭtsimptomon per du paronimaj terminoj? Ekzistas ankaŭ **purpurino** (*de: Purpurin, en: purpurine*);

18. reao (*Rhea*), strutsimila birdo, devus esti **reo** el la ordo de reoformaj (*Rheiformes*). La troa „oscedeco“ de „reao“ memorigas pri tiu de „boao“.

19. senao (*senna, folia sennae*) fariĝu **seno**. La kompleta nomo estas **kasio sena** (*Cassia senna*). Temas pri tropika planto enhavanta glikozidecajn **senozidojn** kun efiko laksetiga. Konfuzoj kun la prepozicio **sen**, la substantivo **seno**, adjektivo **sena**, verbo **sen(igi)** apenaŭ okazus. Se tamen, Akademio de Esperanto povus allasi aŭ iam eĉ dekreti bone motivitan konsonant-duoblignon; tiam la planto havus jenan nomon: **kasio senna** (laŭ la precedentaj Finnlando);

20. verugao (*sp: verruga el la: verruca* signifas interalie ajnan verukon). Do, por nomi la haŭt-malsanon endemian en Sudameriko, nepre sufiĉas la hispaneska **verugo**;

21. vilao (*villa*). PIV referencas al la zamenhofa **villo**. Jen denove inspiro por Akademio de Esperanto koncerne duoblignon de konsonantoj;

22. Voltaio. Kvankam ne temas pri latindevena nomo, tamen ĝin kreis portugaloj (*volta* = reveno). Ni atentigu, ke PM (1971) uzis por la rivero: **Volto**, por la lando: **Voltio**.

El koncernaĵoj en PIVS (1987) ni menciuj:

1. datao (*datum*, plurale: *data*) = dateno laŭ PIV. Al ni ŝajnas plej kongrue kun la semantiko de la latindevena vorto, plivastiĝi la fundamentan sencion al ĉiu donitaĵo, ne limigi ĝin al la temp-indika. Do: **dato**.

2. simao (*Sima*). Tiu ĉi akronimo,

lanĉita fare de *Suess* ne estas tre bonŝanca: la simbolo de silicio estas ja Si, sed tiu de magnezio ne estas Ma, sed Mg. Se tamen iu geologo-esperantisto dezirus apliki la terminon, li povas modifi ĝin al Simo. Tamen, pli modernaj estas: eklogita aŭ peridotita terselo.

3. supernovao, v. pli supre: novao.

Fine, en EB (1988) ni trovas:

1. nepao (*Nepa*) devas esti nepo el nepedoj (*Nepidae*). Ĉu vere povus iu konfuzi tiun ĉi „akvoskorpion“ kun „prafilo“?

2. poao (*Poa*). EB mencias ankaŭ la formon poo. Por tiu ni pledas, ĉar la familio estas poacoj (*Poaceae*), laŭ EB: graminacoj;

3. tifaŭ (*Typha*) laŭ EB el tifaacoj, laŭ ni tifo el tifaĵoj (*Typhaceae*). Konfuzo kun la infekta malsano ne minacas;

Resume ni povas konkludi, ke enkondukado de neoficialaj -A-vortoj okazis:

1. tro facilanime, sen necesa analizo de la koncernaj latinaj originaloj

2. tro ofte sub nerealisma timo antaŭ homonimoj.

Nun ni esploru aperon de -E-vortoj, nome tiuj, kies radikfinon malprave konsistigas -E-.

Tiaspecan vorton ni vane serĉus inter la fundamentaĵoj. Ne apartenas ĉi tien ekz. hordeo (*hordeum*), kazeo (*caseus*), oleo (*oleum*), piceo (*Picea*), tineo (*Tinea*) k.t.p., ĉar iliaj -E- konsistigas la latinajn, do ankaŭ esperantlingvajn, radikojn.

Same inter la oficialaj radikoj ne

koncernas nian problemon ekz. korneo (*corneo*) kaj soleo (*soleus*). Tamen unusola radiko ne povas plaĉi al ni: poreo (*porrum*). Ĉi-okaze la radikfina -E- estas nepravigebla. Devas esti -almenaŭ por la botanika nomenklatur, se ne por laika uzo - poro, kvankam homonima kun alia oficialaĵo. Eblus ankaŭ porro.

Bedaŭre, neoficialaĵoj - kiel atendeble - pekas plurfoje:

1. akneo estas laŭ PIV distingata disde la fundamenta akno. Tamen, laŭ nia scio, moderna medicino uzas la laste nomitan terminon ankaŭ por iversaj haŭt-malsanoj. Ekzistas ankaŭ jena termino: *acnitis* = aknitido;

2. akreo (*ager*) devas esti la zamenhafa akro, homonima kun la fundamentaĵo akra. PIV registras jene: akro² = akreo. Kial? Nu jes, pro la tim' antaŭ homonim' (eĉ se „akra“, tamen tute sendanĝera)!

3. bovisteo (*Bovista*) estas neakceptebla misformo de bovisto. Estus ridinde, konfuzi bovpaŝtiston kun manĝebla fungo...;

4. cefaleo estas superflua misformaĵo por cefalalgio (kapdoloro). La helena finaĵo -E forfalas ankaŭ en ceteraj derivaĵoj: cefalino, cefalometro, cefalopodo, cefaloptero, cefalotomio k.s.;

5. diatomeoj estas ja klaso de mikrokosmaj algoj, sed PIV forgesis registri la ĉefajon: la genronomon diatomo (*Diatoma*);

6. gramineo ne plu estas uzata en la botanika sistemo. La koncerna ordo nun estas nomata poaloj (*Poales*), la

- koncerna familio **poacoj** (*Poaceae*);
 7. karpeo (*carpus*) estas laŭ PIV karpoo
 2, la fundamentaĵo. Temas do pri
 misformita radikoj, tute superflua;
 8. lupeo (*lupa*). La fundamenta lupoo
 devus alpreni la 3-an sencnon, nome tiun
 de konvekso lenso;
 9. nereoo (*Nereis*) estas iom alispeca
 fenomeno. Temas ne pri vastigo, sed pri
 malvastigo de la radikoj. Devus esti
nereido;
 10. peroneo estas evitinda, eĉ laŭ PIV;
 anstataŭ: fibulo;
 11. satureo (*Satureja*) ne alprenis -E-
 sed ellasis -J-: saturejo; *saturejaefolius*
 = saturejofolia;

En PIVS (1987) estas jenaj
 dubindaĵoj:

1. deriveo = derivaĵo 2. Ni citu: „Por la
 matematikaj uzoj, la specialistoj nun
 preferas la radikojn deriveo...”. Nu, al ni
 ŝajnas tiu ĉi nova radikoj nepravigebla.
 Cetere *Hilgers-Yashovardhah* (1980)
 listigas i.a. jenajn etnolingvajjn
 ekvivalentojn: *da: afledede, de:*
Ableitung, en: derivative, fr: derivée, it:
derivata, nl: afgeleide, pt, sp: derivada.
 El la latinidaj lingvoj, sole la franca
 formas la koncernen parton helpe de
 -E-. Kial do preferi la neinternacian
 francismon, se sufiĉas deriv-aĵo aŭ -ato?
 Eĉ pli feŝdata *Deneva* (1989) ne
 registras la radikojn „derive-“, tro
 senpripense lanĉitan fare de PIVS;
 2. patrono el la teksindustria fakoo estas
 superflua. En etnolingvoj sufiĉas la
 radikojn patron-: *es: patrona, de: Patrone,*
fr: patron k.t.p. Se ĉiu fakoo procedus
 analoge kiel la teksindustria, la leksiko

de Esperanto fariĝus kolekto de „balastaj
 eĉ molestaj“ paronimoj. Eŭs. geologio
 povus lanĉi la terminon „sendimento“,
 por distingi disde sendimento
 ĝeneralsenca: kafa, sanga, urina...;

En EB (1988) ni trovis unu terminon,
 en kiu la originala radikoj estas
 plivastigitaj per -E-, nome cikloneo.
 Tamen, ĉi-koncerne ni ne rajtas riproĉi:
 Regiono de basa aer-premo ne povas
 esti nomata ciklono, ĉar tiu samfaka
 termino estas rezervita por kirla
 uragano. La PIVa ciklono 2 por la pli
 supra nocio prave ne povas esti
 rekomendata, pro facila konfuzeblo en
 veter-prognozoj.

Friganeo (*Phryganea*) el frigateo
 (*Phryganeidae*), same kiel spireo
 (*Spiraea*) el rozacoj, estas en ordo, ne
 koncernante nian problemon.

Preskaŭ neglekteblaj estas okazoj de
 radik-plivastigo per -I-. Da
 nomenklaturaĵoj kun la radikoj -I-
 estas vera inundo, sed tiu -I- plene
 pravas.

El la sennombraj fundamentaĵoj ni
 menciuj almenaŭ tri animalojn: cikonio
 (*Ciconia*), gobio (*Gobio*), simio (*Simia*)
 kaj tri vegetaloj: lilio (*Lilium*), salvio
 (*Salvia*), vakcinio (*Vaccinium*). La
 latinaj originaloj estas do laŭnature
 esperantigitaj.

La samo validas pri l' oficialaj
 radikoj.

En la svarmo de la neoficialaĵoj ni
 sukcesis kapti tri misformitajn radikojn:
 barbio (*Barbus*) devus esti barbo, laike
 barbfisĉo, etnio = etno laŭ PIV, okulario

(*cs: okulár, de: Okular, fr: oculaire*)
 devas esti **okularo**, apenaŭ konfuzebla
 kun aro da okuloj.

En EB (1988) „fantomas“ formulario,
 por ke la laŭ ni ĝusta **formularo** (*cs:*
formulář, de: Formular, fr: formulaire)
 ne estu komprenata kiel aro da
 formuloj...

Ankaŭ -O-vortoj de ni riproĉeblaj
 raras:

Fundamentaj, same kiel **oficialaj**
 mankas. **Aloo** (*Aloĉ*) kaj la **neoficialaj**
benzoo (*Benzoĉ*) kaj **protozoo** estas en
 ordo. Strangas soloo (= solo laŭ PIV)
 kaj tiroo (mallongigo de tiroido).

Inter la -U-vortoj, nia „rikolto“ estas
 simile magra. Unusola **fundamentaĵo**
 paruo (*Parus*) meritis sciencan nomon
 paro el la familio de la **paredoj**
(Paridae). La **oficialaj** moruo (*morhua*)
 kaj noktuo (*noctua*) ne koncernas nian
 problemon. El la **neoficialaj** cirkuo
(Circus) devus fariĝi **circo** el la
 subfamilio de la **circenoj** (*Circinae*),
 emuo = dromiceo (*Dromiceus*), nanduo
 = reao laŭ PIV, **reo** laŭ ni.

Fontoj

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto
 (1970). - Sennacieca Asocio Tutmonda,
Paris.

Poŝatlaso de la Mondo (1971). -
Kartografie, Praha.

Plurlingva Matematika Vortaro (1980).
R. Hilgers-Yashovardhan. - Leuchtturm-
Verlag, Alsbach.

Matematika Terminaro (1985). *D.*
Deneva. - Bulgara Esperantista Asocio,

Sofio.

Astronomical Dictionary (1961). *J.*
Kleczek - Nakl. Čsl. Akad. Věd, Praha
 Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto.
 Suplemento (1987). - Sennacieca Asocio
 Tutmonda, *Paris*.

Esperanta Bildvortaro (1988). *R.*
Eichholz. - Esperanto-Press, Bailieboro.
 Inversa Vortaro de Esperanto (1989).
B. Pabst. - Esperanto-Centro,
Paderborno.

Kemia kaj Scienc-teknika Vortaro
 (1993). *D. Fortmann - D. Rogers,*
Naperville.

Novaj Honoraj Membroj de UEA distingitaj en Tampere:

Georgo ABRAHAM (Argentino),
Barbara CVETKOVA (Ruslando),
Elfriede ERNST (Belgio), **Adamo**
GORALSKI (polo en Venezuelo),
HAN Moo-hyup (Koreio), **Julius J.**
MANSON (Usono), **Hugo**
RÖLLINGER (Germanio), **Eduard V.**
TVAROŽEK (Slovakio).

Ni funebras...

La 13-an de oktobro 1995 forpasis
Vladimir Rotrekl en sia 72-a jaro. Li
 estis longjara prezidanto de E-klubo en
 Znojmo kaj instruisto de Esperanto,
 ankaŭ al infanoj kaj junularo. La klubo
 en Znojmo perdis en li entuziasman kaj
 laboreman membron, kiu motoris ĝian
 agadon, sed la membraro intencas
 daŭrigi la aktivan laboron.

RECENZOJ

Sergo Elgo: La floroj de l' krepusko. Originala romano. Kooperativo de Literatura Foiro 1995, 168 p.

La ondo de terorismaj atakoj en Francio inspiris la francan esperantistan aŭtoron Sergio Elgo (propranome Georges La-grande) verki romanon parte kriminalan, parte filozofian, pri grupo de junaj teroristoj, preparantaj atakon kontraŭ la armea ministro kaj serĉataj de polico. La streĉa rakontado nin gvidas alteme al spurado de policisto Kramer, al la misterplenaj kunvenoj, homrabo kaj pafadoj de la teroristoj kaj al grupo de intelektuloj filozofantaj pri diversaj revolucioj, ideologioj kaj reĝimoj, kiuj skuis evoluon de la homaro. Kiu estas pli granda krimulo, ĉu teroristo pafanta kontraŭ ministro aŭ la honesta ministro komercanta per armiloj, kiuj en malproksimaj landoj mortigas milojn da senkulpaj homoj? Ĉu necesas per bomboj ribeligi la popolon kontraŭ la maljusta mondo? La titolo estas aludo pri la fama poemaro de Baudelaire *La floroj de l' malbono*, per kies triversa citaĵo la romano finiĝas. Ĉe detektivaj romanoj ne decas antaŭtempe malkaŝi la enhavon, tial ni kontentiĝu per konstato, ke la verko estas skribita per klara kaj tamen inventema lingvaĵo kun trafaj sukaj esprimoj (*domo vestita de abunda hedero, grimaca plato de interna telefono, li stratis tie sola, ili kunlitas, vira voĉo senatente ŝprucinta malantaŭ li, lia incitiĝo forŝvenis, ĉieŝoviĝema mopedo, eligi nekredoblan liston da*

sakroj, trankvile lacertumi en la ĝardeno, miri prie kaj proe).

Giordano Moya: Survoje al universala civilizacio. Esearo, 1995, Barcelona Esperanto-Centro, 205 p.

Kio estas kaŭzo de militoj? Kiuj sociaj kaj psikologiaj faktoroj eksplodigas ilin? La aŭtoro analizas la homan menson kaj la homan historion ekde Sumero tra Ateno, Aleksandro la Granda, Romia Imperio al Napoleono, Hitlero kaj Stalino, ne evitas influojn de grandaj religioj (Konfuceo, Budho, Kristo, Mahometo) je la homa pensado. La futuron de la homaro certe stampos materiala kresko, sed ankaŭ klopodo pri demokratiigo de la socio. La lasta eseo tuŝas Esperanton kaj homaranismon.

La verko rememorigas pri Nova Realismo de Bruno Vogelmann kiel nova kontribuo de esperantistoj al filozofia pensado kaj serĉado de perspektivaj vojoj por la estonteco de la homaro.

Věra Barandovská-Frank: Úvod do interlingvistiky, Nitra 1995, 126 p.

La ĉeĥlingva Enkonduko en interlingvistikon (kvankam eldonita en Slovakio) estas verŝajne la unua detala lernolibro de interlingvisto sur teritorio de Ĉeĥio kaj Slovakio, plie el plumo de fama filologo kaj esperantologo. La aŭtorino unue prezentas la interlingvistikon kiel fakon kaj ĝian rilaton al kulturo, pedagogio, kibernetiko kaj sociologio. Poste sekvas priskribo de la lingva situacio en la mondo ekde la

antikva tempo ĝis nun. Nur post tiu enkonduka klarigo ŝi transiras al planlingvoj, ilia klasifiko kaj priskribo de la plej sukcesaj. Per Esperanto ŝi ekzempligas utiligon de planlingvoj ekz. en komputora tradukado, en sinteza parolo kaj en moderna pedagogio.

Věra Barandovská-Frank: La latina kiel interlingvo, KAVA-PECH Praha 1995. En Esperanto kaj la germana en unu volumo (193 p.), en la ĉeĥa memstare (84 p., 63 Kč).

Tiu ĉi verko kvazaŭ disvolvas la supre menciitan, detale priskribante la aplikadon de la latina en la historio, en la nuntempo kaj perspektivojn por la futuro. Aluditaj estas ankaŭ la aramea, sankrito kaj la greka, kiuj antaŭis latinon en la antikva epoko, kaj la modernaj planlingvoj, kiuj male absorbis latinon en sia leksiko kaj gramatiko.

WILLIAM AULD recenzas:
HETAJRO DANCAS

Eli Urbanová: Hetajro dancas, eldonis Fonto, Chapecó (Brazilo) 1995, 327 paĝoj, kovrilo 3-kolora.

Se ĉi tiu libro ne furoros, mi malesperos pri la esperantistaro. Ĝi estas unika - eĉ ekster Esperantujo ĝi estus rimarkinda maloftaĵo. Temas pri la aŭtobiografio de la poetino - ĉi tie la sufikso *-in* ŝajnas pravigita - Eli Urbanová. Da aŭtobiografioj ni havas plurajn, notinde la lastatempajn *Rakonto de kampara bubo* de Bruno Najbaro kaj la trivoluman de

Gerrit Baveling, sed neniun similan al *Hetajro dancas*, aŭ eĉ kompareblan. Ni havas ŝian certigon, ke „tiel, kiel mi tion priskribis, ĝi efektive okazis!“, sed eĉ sen tio la rakonto portas la markon de la vero.

Eli estas homo miageracia, ankaŭ esperantisto miageracia. Kiel bone mi memoras la alvenon de ŝiaj unuaj poemoj dum la kvindekaj jaroj kaj la eldoniĝon en 1960 de ŝia poemaro *Nur tri kolorojn!* Kiel forte impresis nin, la Kvaropon, la arta ardo kaj sensuala kolorpleno de ŝiaj poemoj! Jen estis poeto individue erotika, pasie romantika! En ŝia libro ni trovis poemeiklon *Hetajro dancas* (metaforo per kiu ŝi titolis ankaŭ sian novan prozverkon), kiu ravis nin. Mirigas min legi nun la tiaman opinion de konata literaturisto D-ro Pumpr: „Laŭ mi la kolekto ne estas interne trakomponita kaj ĝia arkitekturo ŝajnas sufiĉe hazarda“. Do mia, kiel li verdiktus, se li havus okazon legi ŝian aŭtobiografion, kies „arkitekturo“ kelkfoje ŝajnas „sufiĉe hazarda“! Ja tio estas unu el la fortaj imponaĵoj de la verko! Kaj eĉ ŝia amata Julio baghy riproĉis al ŝi supozatajn mankojn kaj disdegne certigis al ŝi: „Iom da pacienco kaj vi kreos ion eksterordinare belan en nia literaturo poezia“. Nu dankon, majstro. Kiom la homoj kapablas blindigi sin per antaŭjuĝoj, ĉu ne? (Sed al Baghy ankaŭ *Kvaropo* ne plaĉis, pro la „troaj neologismoj“.)

Unu jaron poste aperis poemaro *Nova Ezopo* de ŝia edzo Stefo Urban, poeto tute alispeca, kaj profesia komponisto

/muzikisto. (Li mendis de mi maristajn kantojn, por kiuj li komponis melodiojn. Tiujn tekstojn Kajto poste proprigis al si kaj Nanne Kalma havigis al ili melodiojn komplete aliajn: interesa sperto por poeto.) Nu, kian harmonian hejmon li fantaziis al mi - malgraŭ atestaĵo de ŝiaj poemoj, ekzemple „Laŭ mia edz“, „Malvarma edzino“ (redonitaj ĉilibere) ktp: jen kunvivas du artistoj-kreantoj kuraĝigintaj sin reciproke kun ambaŭflanka respekto. Ho ve, la realo estis iom alia; la poemoj pravis.

En sia aŭtobiografio Eli nenion domaĝas al la legantoj. Edziniĝo al viro signife pli aĝa, krome seka kaj satirema, alportis seniluziigojn. Ŝi bezonis kisetojn kaj amemajn karesojn, sed por tio Ŝtefo estis nekapabla: la romantikon li malrespektis tiel arte kiel arde. Liaj amorpostuloj ne estis ĉiam simplaj, kaj kelkfoje randis perversaĵojn. Kiel ni scias tion? La aludoj de Eli estas sufiĉe klaraj kaj ne malofte eksplicitaj. La legonto devas scii anticipe, ke Eli estos ĉiam konsternite honesta. Ŝi senhonte analizas sin kaj siajn spertojn, kaj konigas al ni aferojn, pri kiuj la homoj pli ofte preferas silenti. Tamen almenaŭ tiu ĉi leginto ne trovis tion ofenda aŭ forpuŝa: nenio homa estu al ni fremda!

La edza frido pelis ŝin al supraĵaj mal-fideloj - ni komprenas, ke Eli estis nature flirtema kaj frandis viran admiron - kaj finfine ŝi trovis amanton, kiu plenumis ŝiajn revojn: Jan Zemek. Eli kaj Ŝtefo divorcas. Mortas Jan, sed la vivo daŭras por Eli, ankaŭ kun amantoj kaj amorantoj.

Oni tamen ne supozu, ke la libro estas

nenio alia ol kroniko pri amaj spertoj. Tute ne! Ni renkontas sur ĝiaj paĝoj multajn aliajn esperantistojn (kun multaj el ili mi siatempe korespondis, kaj ŝatas vidi ilin per la okuloj de Eli). Sed kial Nikolaj Rytjkov aperas ĉi tie kiel Nikolaj Rudkin? Aparte plaĉas al mi Ŝustr, modelo de esperantisto:

„Mi volas mencii sole pri tio, ke li konstruis la Esperantan bibliotekon kaj ke li trifoje savis ĝian sorton, la unuan fojon dum la germana okupacio, la duan fojon, kiam la klubo perdis la ejon kaj la trian fojon en la jaro 1952 post la dumtempa likvido de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Imagu, ke vi devus hejme deponi du milojn da libroj. Ne ĝis morgaŭ, sed por nedefinite. Versajne vi ne estus tro entuziasmaj. Ŝustr ne hezitis kaj konservis ilin en sia loĝejo. Kaj kiel pasis la tempo, li aldonis al ili ankoraŭ tri milojn da volumoj...“

Mencio pri la germana okupacio memorigas min, ke la „ekstera mondo“ vere, eble surprize, malmulte trudiĝas en la kronikon. Pri la Dua Mondmilito ŝi pli-malpli rakontas nur, kun prava patriotisma fiero, pri la herooa mortigo de la besteca „regna vicprotektoro“ Reinhard Heydrich fare de kvar kuraĝaj ĉeĥoj, kaj pri la terura germana venĝo; kaj pri aeratako kontraŭ Prago je la 14a de februaro 1945. Eble tio tamen sufiĉas. La postmilitan reĝimon ŝi aludas nur per du-tri flankaj mencioj de „materiisma filozofio“, kaj per unu signifoplena okazaĵo:

„Ke li ne mortis, konfirmis al mi Ivo Lapenna, kiu en tiu tempo vizitis

Pragon. (Preterdire pro nia dekminuta dialogo en aparta ejo, kie ni estis geduaj, mi estis poste demand-esplorita en la Ministerio por Enlandaj aferoj...).

Eble ne estas tiel surprize. Se mi verkus aŭtobiografion (por kio mi estas tro-tro multe privata persono), mi dubas, ĉu la enlanda politiko ludus en ĝi gravan rolon!

La lingvaĵo kaj stilo de tiu ĉi bela rakonto estas viglaj kaj (kiel kutime ĉe la fortakarakteraj homoj) sufiĉe proprecaj. Dank' al dio, ŝi ŝparas al ni la konatajn ekscesojn de Piĉ kaj la t.n. praga skolo. Ŝi konsentas: "Klare ke mi ne intencas la legantojn forpeli per tro multaj neologismoj". Per tio ŝi estas saĝa kaj sagaca, kaj rekonas, ke bizara lingvaĵo la homojn ne logas. Pri unu tamen escepto mi volas forte riproĉi ŝin. Temas pri tio, ke ŝi sufiĉe ofte uzas proponitan bastardan prefikson *po-* „por ripetiĝinta ago“ (Piĉ). Tio estas nekredeble atenca. Nia fundamenta vorto *po* jam estas ofte uzata prefikse: poiome, popece, popare ktp., kaj rezulte la nova prefikso estas rekte miskompreniga. Kaj se ni tiun adverbigas aŭ adjektivigas (laŭ normala esperanta maniero): poe, poa, ĉiu povas konstati la fiecon de tiu arbitra nenecesa propono.

Sed mi ne intencas fini per tia, la sola, amara noto. La libro estas alkroĉige leginda, kaj se ĝi ne furoros... Cetere ĝi estas, laŭkutime ĉe eldonejo Fonto, libro fizike bela kaj alloga pro la bonkvalita papero kaj agrable estetika presado.

Elkoran dankon, Eli, poetino, kuraĝulino, pli fajra ol hetajra: via danco

sorĉas.

Redakcia rimarkigo: Se patrino disdonas al kvin infanoj po unu pomo, ŝi kvinfoje ripetas la saman agon. De tie verŝajne devenas la eksperimenta uzado de *po-* ĉe verboj en ripeta senco: *podrinki* = drinki po malgrandaj gluttoj, *podormi* = dormi po mallongaj rompataj dormetoj (tiel dormas avoj), *postari* = stari po senpaciencaj moviĝetoj kaj paŭzetoj (enuanta aŭ nervoza persono) ktp. Simile la rusa tradukinto de *Majstro kaj Margareta* uzis *-er-* en momenta senco: *tremeri* = fari unuopan eran tremon. La Esperanta gramatiko tion permesas, estas nur demando, kiel analizi la signifon de tiaj verboj kaj ĉu la aplikoj de la proponantoj estas ĝustaj. Eble helpus pli trafe difini la aplikon de *po-* ĉe verboj, ekz.: „plenumi la agon po malgrandaj kvantoj kun paŭzoj“.

Korespondi deziras

Anojn de Ĉeĥa Asocio por Psika Sano, filio OSTRAVA, memrajtaj, kiuj lernas la lingvon Esperanto, serĉas geesperantistojn enlande kaj eksterlande psike malsanajn, sed memrajtajn, por korespondado kaj reciproka gastigado. Ni petas ankaŭ sanajn geesperantistojn atentigi psike malsanajn gesamideanojn. Ni atendas viajn leterojn: Česká společnost pro duševní zdraví, esperantská skupina, Skautská 1081, 708 00 Ostrava-Poruba, Ĉeĥio.

**Jizersko-krkonošský
ledňáček - 6** (aneb Kocour není doma)

datum konání:

čtvrtek 25.1.1996 - neděle 28.1.1996

místo akce: rozhraní Jizerských hor a Krkonoš - rekreační chata Pozemních staveb - Horní Polubný

druh akce: tradiční setkání mladých i méně mladých přátel esperanta a esperantistů.

doprava: autobusem z Jablonce n.N. nebo Tanvaldu směrem na Harachov - zastávka PŘÍCHOVICE-MOTOREST, nebo H.POLUBNÝ-Kostel. Vlakem zastávka KŘEŇOV.

kapacita: 30 lůžek

ubytování: vícelůžkové pokoje. K dispozici kuchyňka, lednička, televize a společenské místnosti, čaj

cena pobytu:

dospělý člen ČES: 165 Kč

dítě do 14 let: 150 Kč

dospělý nečlen ČES: 175 Kč

Děti do 10 let zdarma, pokud budou sdílet lůžko s rodičem.

program:

čtvrtek 25.1.

- příjezd, ubytování, společné posezení, volba horského vůdce

pátek 26.1.

- 6.00 budiček

- 6.05 rozcvička, osobní hygiena, konzuma hrachovky

- 9.00 sportovní den - lyžování, sánkování, bobování, výlet do okolí

- večer u krbu, opékání donesených uzenin, písničky s kytarou

sobota 27.1.

- další sportovní den dle výběru.

- večer společenské hry, oslava Postelvestra 95. Překvapení. Volná zábava - noční proud.

neděle 28.1.

- úklid, rozoučení, zápis do kroniky

platba: výše uvedenou částku zašli na adresu: Antonín Svoboda, Kamenný Pahorek 559, Košťany 417 23.

termín: 20.12.1995

poznámka: kdo uhodne, jaká bude v pátek polévka, dostane ji zadarmo.

PASPORTA SERVO

Pasporta Servo je služba esperantského hnutí převážně mladým esperantistům. Její členové mají možnost získat bezplatné ubytování na cestách. Majitel vlastního exempláře seznamu hostitelů je členem a má právo seznam použít k vyhledání hostitele v cizích zemích.

Jak mohu seznam použít? V seznamu jsou u každého hostitele uvedeny podmínky, za jakých je ten který hostitel ochoten pohostinství poskytnout (počet hostů a dní). Ubytování je nutno předem dohodnout písemně nebo telefonicky, stejně jako další služby (např. prohlídku města). V žádném případě nepřekvapujte hostitele nečekaně - není to slušné a může mít obsazeno. Hostitelství je jeho právo a dobrá vůle, nikoliv povinnost. Jak se stát členem? Existují dva způsoby:

1. Koupíte seznam hostitelů a napíšete na obálku své jméno. Seznam je vydáván každoročně a platí vždy do nového vydání.

2. Stanete se hostitelem. Kaŝdý, kdo se sám objeví v seznamu, dostává exemplář zdarma a tak získává členství. Hostitel musí každoročně potvrdit, že i nadále hodlá v seznamu zůstat.

Dlouho očekávaný seznam Pasporta Servo 1995 právě vyšel. Pište na adresu: Lucie Karešová, Tylova 1262, 508 01 Hořice.

Cena: členové ČEJ 40 Kč
ostatní 80 Kč

CSEH-METODIKA SEMINARIO

profundiga B-kurso
1996/05/15-1996/05/19

En la landa triangulo de Pollando,
Ĉeĥio kaj Germanio
AntaŭINFORMO

La seminario celas atingi interesitojn, kiuj parolas E-on, kiuj (eble eĉ) instruas ĝin kaj kiuj emas ricevis enrigardon en la metodon de Andreo Cseh. Estas rekomendinde, ke la partoprenantoj estu finintaj la bazan A-gradan Cseh-kurson. Sub gvido de Katalin Smideliusz el Hungario dum kvar tagoj ni havos en internacia grupo la eblecon lerni kaj studi, provi kaj provinstrui, demandi kaj malaperigi necertecojn... Kvar tagoj da intensiva laboro - tio signifas, ke necesas antaŭkonoj rilate al gramatiko kaj E-literaturo. Pro tio ni povas fari tiel, ke ni pli frue sendas al vi kelkajn taskojn, legaĵojn ktp. tiel ŝparante tempon dum la seminario.

La lokoj estos limigitaj je 25 personoj. Tial anoncu vian intereson

rapide! Partoprenantoj ĉeestontaj tutan tempon estas preferataj. La aliĝo validas nur post nia konfirmo kaj post la pago de la partoprenkotizo (por poloj kaj ĉeĥoj 40 DM, por germanoj 100 DM).

Vian intereson sciigu al: Esperanto-Jugend Brandenburg/Berlin, Berliner Str. 49, D-14467 Postdam aŭ Deutsche Esperanto-Jugend, Chausseestr. 8, D-10115 Berlin.

ALVOKO

Urĝe necesa: Centra Ĉina
ESPERANTO-BIBLIOTEO kaj
ESPERANTO-MUZEO.

Kun granda bedaŭro kaj tristeco mi konstatis dum la lastaj jaroj, ke la granda Ĉina Esperanto-Movado, tiom grava por la evoluo de la Internacia Lingvo, ne posedas Centran Ĉinan Esperanto-Muzeon kaj Bibliotekon. Konsidere de la multaj talentitaj kaj meritataj ĉinaj aŭtoroj, sciencistoj, lingvistoj kaj fakuloj de la socia vivo estas granda manko, ke ĉiuj tiuj kapablaj homoj ne povas disponi pri **Centra E-Biblioteko**, ĉar ofte ili bezonas utiligon de literaturo el tuta mondo, ofte ili bezonas librojn ne plu haveblajn ĉe eldonejo kaj ili bezonas ofte superrigardon super la ĝisnuna literaturo de sia laborkampo. Krome tia Biblioteko devas havi kolektaĵojn de ĉiuj ĝis nun aperintaj periodaĵoj en Esperanto kaj pri Esperanto, aldone lingvistikan literaturon pri la problemoj de mondlingvo kaj planlingvo. Por scienca

kaj kreativa laboro tia E-Biblioteko estas nepre bezonata, fine ĝi estas necesa pro la ĝenerala klerigado.

Centra Ĉina Esperanto-Muzeo

La historio de la Ĉina Esperanto-Movado estas tiom interesa kaj grava por la evoluo de mondlingvo, ke estas nepre necese fondi tian Mueon plejeble baldaŭ. Ĉar atendado signifas, ke multaj objektoj haveblaj ankoraŭ nuntempe, ne plu ekzistas post kelka tempo.

La Muzeo devas enhavi jenajn objektojn:

1. insignoj iam produktitaj
2. kalendaroj, mubildoj, afiŝoj
3. murteksaĵoj
4. figuroj
5. teksaĵoj, artaĵoj, flagetoj
6. Zamenhofaĵoj
7. fotobildoj de ĉiuj sektoroj de Esperanto-vivo kaj de Esperanto-monumentoj kaj memoraĵoj
8. Esperanto-varbaĵoj (objektoj kaj presaĵoj)
9. Esperanto-etikedoj sur varoj
10. aliaj interesaj objektoj

Signifo por la lando Ĉinio

Pro la fakto

1. ke la ĉina lingvo ne estos mondlingvo pro malfacileco,
2. ke la angla lingvo estas ege malfacile lernebla por homoj ne apartenantaj al hind-eŭropaj lingvoj
3. ke la ne-anglo-amerikanoj suferas gigantajn malavantaĝojn financajn kaj kulturajn (ekzemple: Germanio devas ĉiujare eldoni proks. 20 miljard germanajn markojn, por Ĉinio tiu sumo ĉiujare pligrandiĝos)
4. ke ĉiu atendado kaj ne-atento pri la

solvo de la mondlingvo pliakrigos la malavantaĝojn por la ne anglo-amerikaj popoloj, do por la plej granda parto de l' mondo.

La ĉina registaro devus subteni la fondon de Centra Ĉina Esperanto-Muzeo kaj Centra Ĉina Esperanto-Biblioteko.

Sed ĈEL (Ĉina Esperanto-Ligo) ne devas atendi la subtenon de la registaro, tamen urĝe peti la registaron pri subteno. Intertempe ĈEL ne atendu, sed realigu la jenajn agadojn:

- a. ... trovi domon aŭ ĉambregojn por Muzeo kaj Biblioteko
- b. alvoki ĉiujn esperantistojn kolekti objektojn por la Muzeo kaj sendi ilin al la centro aŭ informi pri ekzistado de tiaj objektoj
- c. nomumi 2 komisiitojn, unu por Muzeo, la alian por la Biblioteko
- d. elekti por tiu celo talentitajn kaj fervorajn homojn
- e. peti la registaron pri konsento de ĉiujara monsumo por la realigo de la projektoj
- f. publikigo de atentigo, ke oldaj esperantistoj posedantaj bibliotekon aŭ muzeon interesajn objektojn heredigu tiujn al la Centra Biblioteko aŭ Muzeo.

Konsilado

La Germana Esperanto-Biblioteko en D-73432-Aalen, Gmünderstr. 9, estas preta konsili kaj laŭ eblo helpi pri la organizo kaj administrado de tiaj institucioj.

Resumo

Multa valora tempo pasis, dum kiu estintus eble fondi kaj organizi tian bibliotekon kaj muzeon. Dum tiu tempo relative granda stata subteno estintus

ebla. Sed bonvolu pripensi, ke la multaj bibliotekoj kaj muzeoj de la Esperanto-Movado en la cetera parto de l' mondo preskaŭ ĉiuj estis fonditaj kaj daŭre plibonigataj kaj pligrandigataj de individuaj aŭ grupaj esperantistoj, kiuj faris la laboron kaj la pliriĉigon de Muzeo kaj Biblioteko senpage kaj pagis la akiraĵojn el propra poŝo. Permesu, ke tiurilate mi ripetas jam diritan rekomendon: Necesas organizi la membrojn de la ĉina E-Movado tel, ke ĉiu membro pagu sian monatan kotizon, por ke la ĉina E-Movado havu sanan finan bazon. Cetero tiel estis en Eŭropo jam antaŭ la Unua Mondmilito, kiam la salajroj de laboristoj estis proksimume egalaj al la nunaj ĉinaj.

Ĉiu el la muzeoj kaj el la bibliotekoj de la Esperanto-Movado estis kreita de fervora, entuziasma esperantisto aŭ Esperanto-grupo. Nur homoj, kiuj amas sian tiaspecan taskon, atingos antaŭe ne supozitan altan staton de la posta preta objekto.

Karaj samideanoj ĉinaj, kvankam iurilate ekzistas malperfektaĵoj, ni tamen admiras la ĉinan Esperanto-Movadon, kiu donis multan valoran kontribuon al la internacia Esperanto-Movado, inter kiuj mi volas nomi EL POPOLA ĈINIO, Ĉinan Esperanto-Eldonejon, la neforgeseblan UK 1986 en BEIJING. La Ĉina Esperanto-Movado kontribuis multon al la amikeco inter la popoloj. Ĝi prosperu kaj floru!

Rimarkigo: Antaŭ kelkaj tagoj ĈEL skribis al mi, ke ili akceptis mian proponon kaj volas tuj komenci kolekti librojn kaj esperantaĵojn.

Bruno Vogelmann
Germanio

LIBRARO DE STS-ĈEA

(daŭrigo)

La biblioteko de la science-teĥnika sekcio de ĈEA nun troviĝas je la adreso: Ing. Jan Pospíšil, Petrohradská 3112, 272 04 Kladno.

I-F 042: Kun LOT de Ateno ĝis Zuriĥo, 7p., Eo

I-F 022: Sborník technických prací ZVÚ v Hradci Králové. 1967, 56p., Cs, resumoj en Eo

F 057: Bartovská, M.: La teksokombilo. El: SR 23, 1972, n-ro 2, p. 101-106, Eo

I-F 023: La linindustrio en Belgujo. 18 p., Eo

I-F 163: Apliko de komputiloj. AEST 1981, Žilina, 2-a volumo, 81 p., Eo

I-F 166: Bertin, Ch.: La programlingvo PASCAL. 1982, 78 p., Eo

F 167: INTEL 8080 - priskribo kaj programado. Trad. Ch.Bertin. El: SR 30, 1979, n-ro 1, p. 7-38, Eo

I-F 142: Restrepo, L.G.: Aŭskultivo kaj parolivo de la komputiloj. Konceptoj pri komputiloj. 1979, 1976, 10+2 p., Eo

Arto. UDK 7

F 009: Silva, A. da: La prahistoria arto, 1974, 24 p., Eo

F 122: Tichý, J.: Pitrmann (Pri pentristo...). 1966, 12 p., Eo

Lingvoj. Lingvoscienco. UDK 8

F 033: A vy govorite na esperanto? 11 urokov dlja radioljubitelov. 1977, 44 p., R,Eo

- I-F 102: Blanke, D.: Auszug aus der Dissertation A zum Thema: Plansprache und Nationalsprache... 1975, 19 p., D
- I-F 103: Blanke, D.: Zur wissenschaftlichen Beschäftigung mit Plansprachen. 44 p., D
- I-F 104: Blanke, D.: Interlinguistik und interlinguistische Forschungen. 18 p., D
- F 100: Eichholz, R.: Provizora laborplano. Cirkulero TC 75/1. 1975, 24 p., Eo
- F 157: Eichholz, R. kaj V.: Eo, la solvo de niaj lingvaj problemoj. 1981, 472 p., Eo, E
- I-F 152: Košický, S.: Porovnanie morfematickej štruktúry slovenčiny a esperanta. Diplomová práca. 1981, 89 p., Sk, Eo
- F 093: Novobilský, V.: Informatika a problémy mezinárodního plánovaného jazyka v období vědeckotechnické revoluce. En: Sborník Pedagogické fakulty v Ústí n.L., 1979, 136 p., Cs
- F 147: U pie ski, J.: Lingvaj obstaklaj en la interpopola komunikado. 1979, 16 p., Eo
- F 065: Wüster, E.: Konturoj de la lingvonormigo en la teknika. 1936, 130 p., Eo
- Geografio. Biografioj. Historio. UDK 9**
- F 072: La antikva Rigò. 1978, 48 p., Eo
- F 076: Aŭstralio - koncizaj faktoj. 1974, 88 p., Eo
- F 073: Balabanov, B.: Bulgario. 1959, 284 p., Eo
- F 080: Demokratia Respubliko Vjetnamio. 1975, 204 p., Eo
- F 078: Deristka, T. - Lubojanski, J.: Polaj okcidentaj kaj nordaj teritorioj. 1966, 192 p., Eo
- F 133: Eichholz, V.: Impresoj de esperantistino en Srilanko. (1979), 12 p., Eo
- F 079: GDR - bildoj kaj faktoj. 1969, 256 p., Eo
- F 130: GDR. Gravaj koncizaj informoj. 24 p., Eo
- F 074: Juĝu mem! Faktoj pri Ĉeĥoslovakio. 1961, 116 p., Eo
- F 077: Scherer, K. - Romijn, J.: Nederlando. 104 p., Eo
- F 075: Szamosv Lgyi, E.: Hungario 1945-65. 1966, 64 p., Eo
- F 139: Vizitu Ĉeĥoslovakian Respublikon. 10 p., Eo
- F 083: Hube, W.: J.A.Komenský. Pioniro de internacia lingvo. 1970, 16 p., Eo
- F 082: Kníchal, O.: Komenio kaj la internacia lingvo. 1974, 16 p., Eo
- F 081: Novák, J.: J.A.Komenský, 1921, 28 p., Eo
- F 164: Novobilský, V.: J.A.Komenský a interlingvistika. En: Sborník z konference ...1982, p. 20-34 (76), Cs
- I-F 084: Vožda, G.: Komenský stále živý. Seriál citátů a vyobrazení. 1970, 14 p., Cs; Ea flugfolio
- I-F 172: Lorenc, F.V.: Z mých vzpomínek. 1934, 13 p., Cs
- F 007: Staňa, Ć.: Granda Moravio. 1963, 8 p., Eo
- F 148: Beckmann, K.: Historio de Eo. Skizo. (1980), 12 p., Eo
- F 158: Glier, W. - Wiessbach, W. - Müller, A. - Conrad, M.: Zur Geschichte der Arbeiter-Esperanto-Bewegung im Bezirk Erzgebirge-Vogtland (1907/1933). 1976, 40 p., D
- F 109: Golden, B.: La moderna arkeologio, ĝiaj celoj kaj metodoj. 1976, 10 p., Eo

(daŭrigota)

Český esperantský svaz
ESPERANTO, p. s. 1069
111 21 Praha 1
☆☆ STARTO ☆☆

Periodikum Českého esperantského svazu
Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno
Členská evidence a změny adres: Květa Hubnová, ČES Praha

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio
Abonprezo: 15 gld
Redaktoro: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno
Ĉeĥa Respubliko

Podávání novinových zásilek povoleno
Českou poštou, s. p., Odštěpným závodem Severní Morava,
č. j. 1533/95-P/1 ze dne 3. 8. 1995

NOVINOVÁ ZÁSILKA
Poštovné hrazeno v hotovosti
u pošty 746 01 Opava 1

JAROSLAV LISÝ
NEUMANNOVA 48
60200 BRNO